


# ESPERANTOLEHTI

Esperanta Finnlando ♦ Esperantobladet ♦ marraskuu ♦ novembro ♦ 5/2007



*En Stundars Margit Holm montris al ni infanlibron esperantlingvan. Kaj kion ni vidas: Ĝi iam apartenis al Tyyne Leivo-Larsson, parlamentanino, ministrino, la unua virina ambasadoro (en Oslo) de Finnlando, sekretario en la 30-aj de la esperanto-klubo de Helsinki. (Pri Aŭtunaj Tagoj sur p. 18-22.)*

## **Karavano al Roterdamo, p. 14**

**Valamo-kursoj 2008, p. 15 ♦ Malfermaj pordoj en la oficejo, p. 23  
Arta Lumo, s. 9 ♦ Russell John Milton, p. 26**

# ESPERANTOLEHTI

Esperanta Finnlando ♦ Esperantobladet

ISSN: 0787-8206

Kielipoliittinen aikakauslehti. Suomen Esperantoliitto ry:n äänenkannattaja.

Språkpolitisk tidskrift. Organ för Esperantoförbundet i Finland.

Lingvopolitika periodaĵo. Organo de Esperanto-Asocio de Finnlando.

Perustettu/Grundad/Fondita 1918. Esperantolehti ekde/från 1989 lähtien.

Esperanta Finnlando 1918-23, 1948-53, 1959-1987.

Ilmestyy kuusi kertaa vuodessa. Utkommer sex gånger i året. Aperas sesfoje jare.

**Toimitusryhmä/Redaktionsgrupp/Redakta grupo:** ✉ eaflehti@esperanto.fi

Päätoimittaja/Chefredaktör/Ĉefredaktoro: *Mikko Mäkitalo*

Vanha Hämeentie 41 as. 9, 20540 Turku. ☎ (02) 2373 848 ✉ mmakita@utu.fi

Taitto/Layout/Enpaĝigo: *Ilkka Santtila*

Fleminginkatu 12a A 16, 00530 Helsinki. ☎ 050 365 0037 ✉ ilkka.santtila@welho.com

Vastaava toimittaja/Ansvarig redaktör/Respondeca redaktoro: *Anna Ritamäki*

**Tilauhinta/Prenumerationspris/Abonprezo:** 18 e/vuosi/år/jaro;

Jäsenille/ För medlemmar/ Por membroj: 12 e.

**Tilaukset, osoitteenmuutokset/Abonoj, adresŝanĝoj:**

Suomen Esperantoliitto, Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki. ☎ (09) 715 538 ✉ eaf@esperanto.fi

**Prenumerationer, adressförändringar:** EAF, Broholmmsgatan 15 C 65, 00530 Helsingfors.

**Pankkitili/Bankkonto:** Sampo 800017-230825.

Julkaisija/Utgivare/Eldonanto: Suomen Esperantoliitto ry – Esperanto-Asocio de Finnlando.

Painosmäärä/Upplaga/Eldonkvanto: 400

## Esperanto-Asocio de Finnlando ♦ Suomen Esperantoliitto ry

Fondita/Perustettu/Grundad: 1907

**Prezidanto/Puheenjohtaja/Ordförande:** *Anna Ritamäki*

Brokärrvägen 89, 25700 Kimito. ☎ (02) 423 146 ✉ (02) 423 246 ✉ eafprezidanto@esperanto.fi

**Vicprezidanto/Varapuheenjohtaja/Vice ordförande:** *Päivi Saarinen*

Ruorimiehenkatu 5 C 23, 02320 Espoo. ☎ (09) 813 3217 ✉ paivi.saarinen@iki.fi

**Sekretario/Sihtööri/Sekreterare:** *Tiina Oittinen*

Puutarhakatu 26 A 11, 20100 Turku. ☎ (02) 230 5319 ✉ eafsekretario@esperanto.fi

**Aliaj estraranoj / Hallituksen muut jäsenet / Övriga styrelsemedlemmar:**

tuomo.grundstrom

*Tuomo Grundström*, Anundilankatu 3, 26100 Rauma. ☎ 050 5180 590, (02) 822 7779 ✉ @lailanet.fi

*Börje Eriksson*, Keiturintie 274, 16510 Luhtikylä. ☎ (03) 785 1191 ✉ esperarto@phnet.fi

*Taneli Huuskonen*, Lapinlahdenkatu 23 A 7, 00180 Helsinki. ☎ (09) 694 0964 ✉ taneli@poczta.onet.pl

*Jukka Laaksonen*, Orimuskatu 79 B 4, 33580 Tampere. ☎ (03) 2554 724 ✉ jvaletto@kolumbus.fi

**Vicestraranoj/Varajäsenet/Suppleanter:**

*Mira Anonen*, Karstulantie 8 E 70, 00550 Helsinki. ☎ 040 759 2184 ✉ mira.anonen@helsinki.fi

*Olli Pajula*, Salamakuja 4 as 2, 90420 Oulu. ☎ 050 571 9224 ✉ olli.pajula@baanamail.fi

*Timo Pirinen*, Rinnetie 11-13 D 32, 06650 Hamari. ☎ 040 592 1756 ✉ timo.pirinen@gmail.com

**Kasisto/Rahastonhoitaja/Kassör:** *Tiina Kosunen*

Viittakorpi 2 D 22, 02280 Espoo. ☎ (09) 813 3024 ✉ eafkasisto@esperanto.fi

**Pankkitili/Bankkonto (EAF):** Sampo 800017-230825.

**Peranto de UEA / Maksut UEA:lle / Betalningar till UEA:**

Sampo 800020-5995369 (UEA/EAF Päivi Saarinen)

Adreso ĉe la EAF-oficejo. / Käytä Suomen Esperantoliiton toimiston osoitetta.

**Officejo/Toimisto/Kontor:** Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki, avoinna tiistaisin klo 17-19.

☎ (09) 715 538 (puh.vastaaja/respondilo). Malfermita: marde 17-19-a horo.

**Internet:** <http://www.esperanto.fi>



# Rezolucio de la 92-a Universala Kongreso

La 92-a Universala Kongreso de Esperanto, kunveninta en Jokohamo (Japanio) de la 4-a ĝis la 11-a de aŭgusto 2007 kun 1901 partoprenantoj el 57 landoj, kun la temo “Okcidento en Oriento: akcepto kaj rezisto”,

Konstatinte, ke ideoj kaj influoj moviĝas ambaŭdirekte inter “Okcidento” kaj “Oriento”, sed ke pro la aktualaj neegalecoj tiu reciprokeco iĝis nevidebla,

Konstatinte, ke tiu sama kaŭzo malhelpas ankaŭ la fluon de ideoj kaj influoj inter aziaj landoj,

Notinte, ke tro rigidaj konceptoj pri “Okcidento” kaj “Oriento” malhelpas interlokajn dialogojn, kaj

Notinte kun kontento, ke la jaro 2008 estas proklamita fare de la Ĝenerala Asembleo de Unuiĝintaj Nacioj kiel Internacia Jaro de Lingvoj,

Rekomendas, ke la rilatoj inter civilizoj kaj kulturoj baziĝu ne sur konflikto sed sur interkompreniĝo, justeco kaj paco,

Konfirmas la potencialon de Esperanto por interponti homojn de diversaj lingvoj kaj kulturoj,

Atentigas samtempe pri la akuta neceso konsciiĝi pri interkulturaj problemoj en kaj ekster la Esperanto-komunumo, kaj rilati kun instancoj kaj asocioj kiuj jam okupiĝas pri tiaj problemoj,

Deklaras, ke la ekesto de regiona kunlaboro ankaŭ en Azio kaj aliaj mondopartoj estas esenca antaŭkondiĉo por la plua disvolviĝo de Esperantaj agadoj tie,

Esprimas la senkondiĉan subtenon de la Esperanto-komunumo al vera plurlingvismo kiel rimedo por akceli unuecon en diverseco, kaj kuraĝigas esperantistojn energie labori por la plenumo de la celoj de Unuiĝintaj Nacioj por la Internacia Jaro de Lingvoj.



Kansainvärlin Esperantoliitto toteaa 92. maailmankongressin päätöslausumassa muun muassa, että ensi vuosi on YK:n julistama kansainvälin kielten vuosi ja että liian jäykät käsitteet “itä” ja “länsi” estävät keskustelua ja ajatustenvaihtoa, ja rohkaisee esperantoyhteisöä ja esperanton harrastajia YK:n tavoitteiden täyttämiseen.

(mm)



## Unueca en sia diverseco

Eŭropo, kaj la Eŭropa Unio, estas unueca en sia diverseco – tiu estis slogano, kiu venkis en konkurso kun 80 000 eŭropaj partoprenantoj kaj iĝis la identeca slogano en la kontrakton pri konstitucio de la Eŭropa Unio.

La slogano estas trafa, ankaŭ pri la proceso de aprobo de la konstitucio. Rezultoj en diversaj landoj estis diversaj: iuj aprobis ĝin, aliaj malaprobis ĝin kaj resto ne bezonis fari decidon, ĉar la malaprobo en iuj landoj jam signifis, ke la kontrakto ne validos. Unuece por la diversaj landoj estas, ke la civitanoj preskaŭ neniom sciis, kion la konstitucio enhavas.

Oni ne povas akuzi la Union, ke ĝi ne strebus informi pri si. Estas ja informcentroj pri EU, ekzemple en Finnlando en ĉefurbo de ĉiu provinco (kutime en ilia biblioteko), kaj tie senpage haveble kaj la tuta kontrakta teksto kaj pli facile komprenebla konciza priskribo pri ĝi. Averaĝa civitano ne tamen volas streĉi sian cerbon per tiaj, kaj formas opinion pri la afero laŭ ĝenerala imagbildo pri la dezirindeco de plia unuiĝo de Eŭropo.

Mi tralegis la tutan tekston de la konstitucio. Ĝi ne estas tre facile komprenebla teksto. En multaj lokoj teksto de unu artiklo aludas al iu alia aŭ pluraj aliaj artikloj, en multaj kazoj eĉ al iu tute aparta kontrakto. Plejparte ankaŭ la temo estas fakoj kiujn mi ĝenerale ne komprenas – ekonomio, komerco kaj financoj – kaj nur malmulto pri la fakoj, kiujn mi pli bone komprenas – sciencoj kaj naturprotektado. En la 200-paĝa kontrakto estas nur 2-paĝa ĉapitro pri naturpro-

tektado kaj 3-paĝa pri scienco – krome kelkaj paĝoj pri temoj proksime al ili kaj kelkaj unuopaj mencioj pri ili – dum nur pri ekonomia kaj mona politiko estas ĉapitro de 25 paĝoj kaj krom tio multaj longaj partoj pri financaj sistemoj kaj regulado de komerca konkurado.

Mi tamen kuraĝas supozi, ke mi nun havas ian komprenon pri kio la kontrakto celis. Mia konkludo estas, ke tie ne estas esence io ajn, kion mi ne volus subskribi. Plejparte la proponita kontrakto celis konfirmi kaj ete progresigi kaj pliklarigi tiujn principojn, kiujn oni jam en leĝoj de eŭropaj landoj havas, aŭ kutimojn, kiuj jam en la Eŭropa Unio funkcias. En iuj kazoj la kontrakto ŝajnas ankaŭ difini regulojn, el kiuj almenaŭ la nacia leĝaro de Finnlando povus ricevi bonan ekzemplon por plibonigi siajn nun mankoze realigitan staton, kiel ekzemple publik-eco de administraciaj dokumentoj aŭ egala traktado de diversaj religioj kaj nereligiaj mondkonceptoj.

Sed Eŭropo, unueca en sia diverseco, ne povis realigi la aferon tiom simple, ke oni nur aprobus la zorge faritan kontrakton. Plejparto el la enhavo de la konstitucio nun daŭros en aproba proceso per nova titolo, reforma kontrakto, kiun la Eŭropa konsilio formis en sia kunveno en Portugalio en oktobro. Ni vidos en la sekvaj du jaroj, kiajn unuece diversajn surprizojn la EU-a komunumo elturnigos en ĝia ratifika proceso.

*Mikko Mäkitalo*

## UK en Japanio

# Esperanto disvastiĝas en Azio

Dum la unua semajno de aŭgusto Esperanto videblis kaj aŭdiĝis en Jokohamo, Japanio kie kolektiĝis esperantistoj al la ĉiujara universala kongreso. Ĝi allogis 1 900 partoprenantojn el 57 landoj, el kiuj la duono el 16 aziaj landoj, el Finnlando 15 partoprenantoj.

Interesaj prelegoj kaj seminarioj traktis kulturon kaj kunlaboron de la regionoj de Azio kaj Pacifiko. Prezentitaj estis ankaŭ la Esperanta versio de komuna historio en Azio, fare de 40 volontulaj esperantistoj. La verko "Historio por malfermi Estontecon – Moderna Historio de Ĉinio, Japanio kaj Koreio" signalizas estontan politikon kaj malfermas vojon al estonteco. Dignon de tiu ampleksa libro pliiĝas ankaŭ tio, ke historiografoj de koncernaj landoj multege klopodis por trovi unuecan nocion pri ege malfacile traktebla temo.

Instruistoj de Esperanto kunvenis por diskuti pri instruado kaj lernantoj ricevis plian edukadon. Specialaj grupoj de Esperantistoj, kiel blinduloj, kunvenis en siaj grupoj dum la kongreso. El Eŭropo partoprenis sep blinduloj kaj el Japanio dudeko. Vidhandikapuloj estis observitaj en ĉia informado, i.a. la brajla versio de kongresa kuriero Ondas Jokohamo atendis jam frumatene sian leganton en la anso de loĝĉambro de vidhandikapita kongresano. Dankegon meritas fidela volontulino HONDA Terumi.

Ĉijare en aprilo, kiam Esperanto-Asocio de Finnlando festis sian centjariĝon, la festparolanto estis prezidanto de UEA, s-ro Renato Corsetti, kies oficperiodo finiĝis en Jokohamo. Kiel nova prezidanto daŭrigas hinda profesoro s-ro Probal Daŝgupta kiu estas Esperantisto ekde juneco kaj laboris en universitatoj en diversaj ►



*TANAKA Tetsuji, prezidanto de JABE malfermis la seminarion en la brajla biblioteko en Tokio. Apud li sidas energia Krizantemo kaj lertaj interpretistoj KITAGAWA Hitasi kaj YAMAKAWA Syūiti.*



*TANAKA Tetsuji, prezidanto de JABE faras notojn pere de eta komputilo, kiun lia edzino Miori montras.*

landoj. Antaŭ du jaroj en la 50-jara festo de Fondumo Esperanto-Säätiö li prelegis en la universitato de Helsinki pri la valoro de Esperanto kiel helpilo klarigi la ecojn de plej diversaj aliaj lingvoj.

### **Seminario en Tokio**

Japana Esperanto-Asocio de Blindaj Esperantistoj (JABE) aranĝis en la brajla biblioteko en Tokio unutagan seminarion pri profesia edukado kaj enlaborigo de vidhandikapitoj. Kunlaborantoj estis tri japanaj gravaj organizaĵoj blindulrilataj kaj aŭspiciis i.a. la Ministerio pri Sano kaj Laboro kaj fondaĵoj pri bonfarto. Teamo de profesinivelaj interpretistoj volontule interpretis prelegojn en Esperanto de la tri eksterlandanoj japanen sinsekve kaj la japanlingvan prelegon kaj diskuton Esperanten samtempe.

Efektivan organizadon de la seminario iniciatis TANAKA Tetsuji, prezidanto de JABE, profesie prezidanto de la Japana Brajla Biblioteko, kaj KIKUSIMA Kazuko (en Esperantujo konata kun nomo Krizantemo), subtenanto de JABE, profesie ĵurnalisto kaj esploranto pri bonfarto.

Prelegantoj traktis temon de seminario multflanke. Hispano Pedro Zurita rakontis kiel la his-

pana blindul-organizo ONCE enlaborigas handikapulojn kiel organizantoj kaj vendistoj de tutlandaj loterioj. La ŝtato koncesiis al ONCE rajton financi sian agadon pere de loterioj kaj tio ankaŭ devigas prizorgi organizadon de certaj servoj por handikapuloj. La enlaborigprocento de viddifektitoj en Hispanio egalas tiun de vidantoj.

Aldo Grassini el Italio klarigis al aŭskultantoj kiel dum jardekoj vidhandikapuloj en Italio funkciis kiel instruistoj ankaŭ en ordinara lernejoj. La pinta nombro estis kiam pli ol unu mil vidhandikapitaj instruistoj laboris en diversaj gradoj de edukado ekde antaŭlernejo ĝis universitato. Nuntempe laboras 350 vidhandikapitaj instruistoj. Pliigo de vizuala edukado kaj rapida ŝanĝiĝo de edukmaterialoj kunportis novan defion, kiu malpliigis restadon de vidhandikapitaj instruistoj sur la edukada kampo.

Reprezentanto de finna grupo Arvo Karvinen referencis en sia prelego la ampleksan esploron de Stakes (esplora kaj evoluiga centro de socialaj kaj sanservaj aferoj) pri enlaborigo en la jaroj 1995-2002. La esploro montras, ke el 25-64-jaraĝaj handikapuloj 20 procentoj estas dungitaj. Por plibonigi la situacion kaj por preventi

retiriĝon de handikapitoj oni devus fortigi ilian eduknivelon esence. Nesufiĉa edukado enkondukas homojn ankaŭ alimaniere en pli malbonan situacion en la socio. Laŭ la jarlibro 2003 de la finna registro de vidhandikapoj (Suomen Näkövammarekisterin vuosikirja 2003) el la laboraĝaj vidhandikapitoj 22 % estis plene dungitaj kaj parte dungitaj same 22 %.

La celo de la strategio 2006-2015 de la Finna ligo de vidhandikapitoj (Näkövammaisten Keskusliitto) estas akiri enlaboriggradon 50 % ĝis la jaro 2010 kaj 55 % ĝis 2015. Ĉi tiun celon eblas alproksimiĝi i.a. pere de intensigo de profesia edukado kaj trejnado pri entreprenado.

### Defioj de laborvivo

Entreprenejoj kaj kompanioj daŭre devas evoluigi sian funkciadon. Dum la evoluigo de procesoj entreprenejoj kaj kompanioj devus pri taksado de bezono de laborforto konsideri handikapitan fakon personaron. Pere de planado de laborforto en procesoj eblas identigi laborojn kaj taskojn konvenajn al diversaj handikapgrupoj, kiam haveblas scioj pri handikapeco kaj oni korekte komprenas handikapecon. Grandiozan antaŭlaboron faris nia konata, fidela volontula asis-

tanto de JABE, KIKUSIMA Kazuko, Krizantemo. Blinduloj loĝis en la sama hotelo, ili havis helpantaron preta ĉiam laŭbezono, ni havis plurajn proprajn programerojn. Dankegon, Krizantemo!

Krome, por procesoj verŝajne estiĝos novtipaj por handikapitoj konvenaj laboroj kaj taskoj dank' al kono de handikapeco. La celo estas enlaborigi konvenan personon en korektan laboron kaj taskon. Tiam lerteco, volo, preteco al trejnado de persono decidas vere.

Kondiĉo de laboro kaj sukceso de handikapulo estas bone aranĝata rekapabligo, havebleco de bezonataj helpiloj kaj favoraj laborĉirkonstancoj, diras s-ro Markku Vaitinen, konsilanto pri entreprenoj kaj organizoj.

Kernaj vortoj por priskribi defiojn de evoluigo de profesia trejnado: bazo en laborvivo, fleksiĝo, individueco, aliro kaj ligita edukado, rekapabligo kaj enlaborigprocesoj.

La strategio 2015 de la finna edukministerio komencas per slogano: “En klerigo estas estonteco”. La esprimo signifas jenajn aspektojn: egalrajtaj edukaj kaj kulturaj servoj estas la fundamento de bonfarta socio kaj pere de sekurigo de ili eblas certigi la mensan, fizikan kaj ekono- ▷

*Pedro Zurita faras notojn. Arvo Karvinen kaj Aldo Grassini aŭskultas interpretadon de japanlingva parolo esperanten.*





*Lertaj interpretistoj  
KITAGAWA Hitasi kaj  
YAMAKAWA Syūiti  
interpretas esperanten kaj  
japanen.*

La ampleksa programo kaŭzis al kongresanoj problemojn elekti la plej interesan temon.

### **Internacia Jaro de Lingvoj**

La Universala Kongreso de Esperanto konstatas en sia rezolu-

cio, ke pensoj kaj influoj moviĝas inter "Okcidento" kaj "Oriento", sed ke pro la aktualaj neegalecoj la reciprokeco iĝis nevidebla. Tiu sama kaŭzo malhelpas ankaŭ la fluon de ideoj kaj influoj inter aziaj landoj.

La kongreso rekomendas, ke la rilatoj inter civilizoj kaj kulturoj baziĝu ne sur konflikto sed sur interkompreniĝo, justeco kaj paco. La kongreso konfirmas la potencialon de Esperanto por interponti homojn de diversaj lingvoj kaj kulturoj. Samtempe oni tamen devus konsciiĝi pri interkulturaj problemoj en kaj ekster la Esperanto-komunumo, kaj rilati kun instancoj kaj asocioj kiuj jam okupiĝas pri tiaj problemoj.

Ekesto de regiona kunlaboro ankaŭ en Azio kaj aliaj mondopartoj estas esenca antaŭkondiĉo por la plua disvolviĝo de Esperantaj agadoj tie.

La Ĝenerala Asembleo de Unuiĝintaj Nacioj proklamis la jaron 2008 kiel Internacia Jaro de Lingvoj. La Universala Kongreso de Esperanto esprimas la senkondiĉan subtenon de la Esperanto-komunumo al vera plurlingvismo kiel rimedo por akceli unuecon en diverseco, kaj kur-aĝigas esperantistojn energie labori por la plenumo de la celoj de Unuiĝintaj Nacioj por la Internacia Jaro de Lingvoj.

*Arvo Karvinen kaj Ritva Sabelli  
Fotoj de Ritva Sabelli*

mian bonfarton de la tuta loĝantaro. Kiel bazangulaj ŝtonoj de la evoluanta socio estas konsiderataj kompetenteco, krea agado kaj preteco al renoviĝo. Altnivela klerigo kreas bonfarton kaj malfermas eblecojn por progreso de socio.

S-ro SASHIDA Chuji, esploristo de la Japana Organizaĵo pri Dungado de Aĝaj kaj Maleblohavantaj Personoj prezentis la celojn de enlaborigo en Japanio. Li ankaŭ prezidis diskuton. Seminarion ĉeestis 70 specialistoj kaj esploristoj sur la kampo de vidhandikapeco.

Ĉeestantoj krome konatiĝis kun la japanaj porblindulaj servoj, vendejo de helpiloj kaj evolulaboro, kiun la blindulorganizo ofertas plejparte al vidhandikapuloj de aziaj landoj pere de kvinjara edukado en Japanio.

### **Internacia Kongresa Universitato**

Kongrue kun la kongreso la Internacia Kongresa Universitato (IKU) havis en Jokohamo sian 60-an sesion. La temoj de prelegoj estis i.a. orienta astronomio: gasto celoj en la galaksia fervojo; malegalecoj je sano kaj ties sociaj determinantoj; geografia informo-sistemo en nia vivo; kapitalismo kaj konfucea kulturo.

Lige kun tri IKU-prelegoj okazis tri kursoj de Akademio Internacia de la Sciencoj kaj du kromaj prelegoj. La kursfinintoj ricevis laŭpete ateston.



## Esperantotaiteilijoita ilman yleisöä

Lukuun ottamatta kolmea maailmankongressia tuskin mikään esperantotapahtuma maassamme on saanut etukäteen niin paljon mainosta kuin Kuopiossa järjestetty Arta Lumo, eli ”esperantotaiteilijoiden lumoa”. Jo Firenzen kongressissa 2006 järjestäjät jakelivat kädestä käteen tiedotteita, puhumattakaan ilmoituksista ympäri Eurooppaa ilmestyvissä esperantolehdistä. Laskin että kotoisessa Esperantolehdistämme oli tapahtumasta ilmoituksia jo vuodesta 2005 lähtien, yhteensä lähes 15 kokosivua sekä lisäksi pienempiä mainintoja. Kuopiossa ilmoiteltiin lehdistä ja mm. torilla oli näkyvällä paikalla ilmoituksia. Joten tiedotusta tulvi näin jälkikäteen ajatellen uskomattomasti.

Järjestäjät olivat hankkineet ympäri Eurooppaa muutamia todella mielenkiintoisia esiintyjä, unohtamatta kotimaan parhaimmista. Paikana oli Kuopion keskeisellä paikalla musiikkitalo, johon mahtui yli tuhat kuulijaa. Joten puitteet olivat todella hyvät. Oletan että järjestäjät suunnittelivat tapahtuman vähintään kahdelle sadalle osanottajalle, mutta...

Arta Lumo oli katastrofi – riittämättömän osanottajamäärän vuoksi. Hyvän kuvan mukanaolijoista saa siitä, että kaupungin tarjoamaan lounaaseen osallistui alle 50 henkeä, mikä lie-nee realistinen luku kokoaikaisista osallistujista. Ja siinä on mukana järjestäjät ja ulkomalaiset niin taiteilijat kuin turistitkin. Oli esityksiä, jotka täytyi perua, koska ei ilmaantunut kuulijoita – alkeiskurssikin mukaan luettuna. Ei yhtään sielua esim. Tampereelta, Turusta vain yksi, nimittäin järjestäjiin kuuluva Tiina, Lahdesta yksi eli meikäläinen, laajalta Helsingin seudulta kolme neljä jne. Ja kun vielä todetaan että Kuopiossa ei tällä hetkellä taida olla esperantisteja, paitsi haalistunut Jussi Jäntti. Mitään tarkkaa lukua on vaikea esittää, koska järjestäjät eivät jakaneet osanottajista listaa.

### Onnistunutta ohjelmaa ulkomaalaisin taiteilijoin

Järjestelyjen ja ohjelman puolesta Arta Lumo oli onnistunut. Arvostan paljon esimerkiksi venäläisen Aleksander Korjenkovin mukanaoloa. ▷



*Duoble Unu: Francoise ja Patrick.*

Hänet tunnetaan ehkä parhaiten La Ondo -lehden toimittajana ja julkaisijana. Korĵenkov puhuu jokapäiväistä esperantoa kuten ihminen, joka käyttää kieltämme päivittäin. Toimittajana hän etenee aiheessaan johdonmukaisesti. Vaikka puhe on tasaista vailla kohokohtia kuin puron solina, se sisältää pieniä teräviä sivuhuomautuksia, joihin kätkeytyy usein huumoria.

Ensimmäinen aihe käsitteli esperantonkielistä lehdistöä. Sen hän tuntee hyvin. Seuraavana päivänä hän kertoi mitä muuta Zamenhof puuhaili kuin loi uuden toimivan kielen. Vain esperantokielen luomisessa hän onnistui, muut osoittautuivat idealistin haaveiluiksi tässä itsekkäässä maailmassa. Kolmas luento käsitteli Sormusten herraa. Teos on juuri painettu esperantoksi kolmiosaisena kokonaisuutena.

Kuulijoita oli ensimmäisellä kerralla yhdestä kahteen, toisella kolmesta neljään, kolmannelle hiukan enemmän. Tarkkaa lukua on vaikea esittää, koska alussa saattoi läsnä olla vain yksi, sitten tuli toinenkin, jopa kolmaskin. Korĵenkovin sanankäyttöä en väsynyt kuuntelemaan. Hänen läsnäolonsa teki ainakin minulle tapahtuman osallistumisen arvoiseksi.

Korĵenkovin kylkiäisenä Kaliningradista oli saapunut nuori kansainvälisestä iskelmälaulajan urasta haaveileva Natalia Striĵnjova. Hänen konserttiaan mainostettiin myös ulkopuolisille, liput 10 euroa. En huomannut sivullisia. Tyttö vaihtoi usein asua ja oli aikuisten esikuviansa näköinen. Hän lauloi muutamia kappaleita esperantoksi osaamatta kieltämme. Musiikki tuli huumaavan kovaa ”nauhalla”, värivalot vilkkuivat. Olo oli kuin nuorisodiskossa. Seuraavana päivänä tyttö matkusti kotiinsa. Jälkeenpäin netissä luin Korĵenkovin tiedotteen, että paikallisessa sanomalehdessä oli ollut uutinen tytön Suomen konsertista.

Nykyaikainen sähkökantele on monelle suomalaisellekin tuntematon instrumentti, johon Suomen esperantoliiton 100-vuotisjuhlissa huchtikuussa Helsingissä osanottajat pääsivät tutustumaan. Muusikko Timo Väänäsen ja tanssija

Päivi Järvisen tunnin mittainen konsertti oli ilmeisesti tarkoitettu päätapahtumaksi, jota mainostettiin ulkopuolisillekin. Kymmenkunta sivullista taisi tullakin.

Esitys koostui Timo Väänäsen kanteleen käsittelystä ja tanssija Päivi Järvisen rajusta liikedinnästä, mikä uhkui voimaa ja rajuutta. Tässä esityksessä kanteleesta lähtevällä äänellä ei ollut juuri mitään yhteistä perinteisen kanteleen helinään. Kuulimme suhinaa, kohinaa, urinaa, vonkunaa, jopa pätkä mandoliinin näppäilyä ja muita ääniä, joita ei voi kuvailla. Värivalot korostivat tanssijan vääntelehtiviä kasvoja, kuului hurjia karjahteluja. Selviä vaikutteita shamanismista. Kuvittelin oitis miten menneisyydessä kylän tietäjä lankesi loveen sen jälkeen kun oli nauttinut puoli kuksallista kuivattuja karpäsieniä. Esitys jäi totisesti mieleen. Yksi shamaanimainen juttu vielä: kannel soitteli omia aikojaan vaikka pelimanni tanssia nytkytteli parin metrin päässä. Tai sitten se oli harha-aistimus.

Järjestäjiltä todellinen löytö oli kutsua tapahtumaan ranskalainen taiteilijapariskunta, joka esiintyi nimellä Duoble Unu. Kysymyksessä ovat ammattilaiset tai ainakin puoliammattilaiset. Francoise soitti pientä hanuria, Patrick kitaraa. Pari esitti mm. mielestäni kabaree-tyyppisen eri maiden musiikista ja tanssista koostuvan ohjelmanumeron. Se oli riemastuttavaa kuultavaa ja katseltavaa. Taiteilijapari ei matkustanut esityksensä jälkeen kotiinsa, vaan oli koko ajan täysin rinnoin mukana valmiina esiintymään aina kun tarvittiin.

### **Pienen esperantoliikkeen suuruuksia**

Anja Karkiainen on Suomen pienelle esperantoliikkeelle aarre. Ei siis ole mikään takarivin taavi niin kuin monet meistä haluavat olla. Hän runoilee ja laulaa. Ja on aina valmis esiintymään. Jazzklubin matalalla oleva katto sopi hyvin hänen hennolle äänelleen. Anjalla taitaa olla voimakas luomsvire päällä; kuulimme esimerkkejä hänen ja kitaransoiton opettajan Vesa Pölkin yhteistyönä syntyneitä lastenlauluja, luonnollisesti esperantoksi.



*Anja Karkiainen, Olli Pajula ja Tiina Oittinen esiintyvät linja-autoretkellä.*

Esperantopiireissä tunnetun rockyhtye Dolchamarin konsertista ilmoiteltiin lehdessä ja ilmoituksilla siellä sun täällä. Maksoi ulkopuolisille viisi euroa. En ollut konsertissa, joten en tiedä yksityiskohtia. Toivon että konsertti onnistui, sillä suomalainen esperantoliike todella tarvitsee heitäkin. Poikia ei juuri muiden joukossa näkynyt, paitsi Kuopion tarjoamalla sapuskalla. Taisivat lähteä kotiin. Ehkä kannattaisi olla enemmän esperantistien joukossa, puhua ja keskustella.

Kun ei muutakaan tekemistä ollut, menin muiden mukana kaupunkiliikenteen linjurilla Puijon kirkkoon, jossa uruista kertoili ja niillä soitteli Esa Toivola. En tiennyt tämän alan taituria olevan esperantoliikkeessämme. Rohkeasti sympaattinen mies kertoi esperantosta. Nyt tiedän miten urut toimivat. Hyvä tietää pakanankin. Päivi ja Tiina myivät optimistisina lippuja. Sivullisia oli kuuntelemassa kourallinen.

Tapahtumassa näin elävänä värikkään hämeenlinalaisen Markku Sarastamon, joka mm. perusti lähes tyhjäan kaupunkiin esperantoyhdistyksen. Miehellä oli punaiset housut ja punainen tukka ja parta ja päässä valkoinen pipo, jossa vihreä esperantotähti. Selvä kylähullu, myönteisessä mielessä. (Kuva lehden viime numerossa, s. 5.) Hänellä oli oma taidenäyttely, ja hänellä oli joku Taika-juttu. Jostakin syystä olin jossakin muualla. Näyttelytyöt, piirrookset ja esineet viittaavat jotenkin primitiiviiseen shamanismiin. Hänen olemuksensa vahvisti käsitystäni, että usein esperanto valitsee harrastajikseen yksilöllisiä ihmisiä.

Solo on espanjalaisen Aduardo Vargas Gutierrezin taiteilijanimi. Monet kansainvälisiin kongresseihin osallistuneet ovat kuulleet häntä. Sama mies on vääntänyt esperantomailman ”kansallislaulun” flamenco-tyyppiseksi. Mies puhuu esperantoa niin espanjalaisittain kuin ▷



### *Linja-autoretkellä Kimmo Hakalan pajutilalla.*

vain voi. Sanoisin että taas yksi erään sortin kylähullu. Miehen ohjelmisto on kovin tekniikkapitoinen: diskomusiikkia, tanssiaskeleita kastanjettien rytmissä, värivaloja, savua, sinne tänne kieppuva vihreä viivakuvio, joka ohjautuu tanssijan pään liikkeiden myötä. Tekniikka peittää miehen mahdolliset taidot. Matkusti A.L:n jälkeen Slovakian Mariboriin, esperanto-tapahtumaan esiintymään. Vertailun vuoksi: tapahtumassa oli reippaasti yli 300 osanottajaa.

### **Tunnelmallisia retkiä ja hetkiä**

Linja-autoretki Kimmo Hakalan pajutilalle ja sen jälkeen toiselle turismiin suuntautuneelle maatilalle oli virkistävä juttu. Viimeksi mainitussa saunottiin, uitiin ja lioteltiin enemmän tai vähemmän syntistä roppaa puisessa pöntössä, nenät vastakkain.

Makkaranpaiston jälkeen Françoise nosti pienen hanurin polvilleen ja alkoi tapailla säveliä. Pian mukaan yhtyivät Patrick ja perheen tytär

huiluineen sekä Olli Pajula kitaroineen ja Tiina Oittinen viuluineen. Intiimi, lämmin tunnelma.

Palasimme takaisin puolen yön paikkeilla läpi hämärtyneen, paikoin usvaan peittyvän tienoon.

Minulla oli tärkeää sekin, että ulkomaalaista keskusteluseuraa löytyi. Esperantoa tuli muuttaman päivän tehokuurina. Viimeisenä iltana ohjelman tapahtuman virallisen päättymisen jälkeen kokoontui järjestäjiä ja osanottajia läheisen koulun eteisaulaan, jossa yhdessäolo jatkui jutustelun, laulun ja soiton merkeissä myöhään yöhön. Innostuttiinpa hetkeksi tanssimaankin. Suurimman vastuun tapahtumasta varmaankin kantoi liittomme puheenjohtaja. Hän purki pettymystään tippa poskella. Näin silmissäni Päivin ja Tiinan myymässä ja repimässä lippuja kirkon aulassa tai konserttihuoneiden ovilla tai päivystämässä kirjamyyntipöydän äärellä. Nyt pitkä puurtaminen ohi oli. Aika rentoutua. Tiinan viulu soi. Ero kaihoa toi.

*Esa Lång*

## Al Esperanto en Finnlando

Okazis en Finnlando someron 2007 du gravaj esperantaj aranĝoj. Por la oka fojo Esperanto-Asocio de Finnlando (EAF) organizis kurson en Popola Instituto de Valamo. Ĝi okazis 23-27 de julio. Tuj poste EAF invitis al Festivalo Arta Lumo 27 de julio-1 de aŭgusto en Kuopio.

Kial Valamo? Ĝi estas grekortodoksa monaĥejo al kiu apartenas la Popola Instituto, situanta en arbaro ĉe la lago Juojärvi en la orienta lag-regiono de la suda parto de la lando. Do ĝi situas bele. Estas tie tranoktejoj kaj bona restoracio. Mi volas ankaŭ mencii la kvietan atmosferon en Valamo, kiu estis mense agrabla. La multaj turistoj ne faris bruon.

Valamo monaĥejo en Finnlando nomiĝas Nova Valamo. La origina monaĥejo situas en Rusio. Tuj post la dua mondmilito multaj monaĥoj rifuĝis okcidenten. Ili povis kunporti multajn monaĥejajn valoraĵojn al Finnlando. Ili ne tuj trovis taŭgan lokon, sed fine ili decidis resti en la loko kie ili nun estas.

Hodiaŭ estas dekdu monaĥoj en Valamo. Por vivteni sin certe multe gravas turistoj kaj kursanoj. Valamo ne ricevas monon nek de la ŝtato nek de ekleziaj organoj. Dum la somero ĉirkaŭ kvindek dungitoj laboras tie kaj ankaŭ ĉiun semajnon ĉirkaŭ kvindek volontuloj.

Oni povas atingi Valamon diversmaniere. Mi iris per ekspresbuso dum ses horoj de Helsinki direkte al Valamo. Aliaj kursanoj, kiuj vojaĝis per trajno, devis eliri la trajnon kvardek kilometroj de Valamo kaj preni taksion. Aliaj havis siajn proprajn aŭtojn.

La kurson partoprenis dekdu esperantistoj, de kiuj naŭ venis el Finnlando, du el Svedio (mi kaj Soile Lingman) kaj unu el Nederlando. Instruis nin Atilio Orellana Rojas de la Internacia Esperanto-Instituto en Den Haag, Nederlando kaj Tiina Oittinen, EAF-sekretario. Ili ŝanĝis inter la du grupoj komencantoj kaj daŭrigantoj. Estis instruado dum tri horoj antaŭ lunĉopaŭzo

kaj dum du horoj posttagmeze. En la daŭriga grupo ni parolis, legis artikolojn pri Finnlando ktp kaj ekzercis gramatikon. Vespere Tiina amuzigis nin per muziko ĉar ŝi ludas violonon.

Estis sufiĉe da libertempo. Ni kune migris en la arbaro. Ni vizitis tipan finnan saŭnon. Ni piediris al la arbara tombejo de Nova Valamo. Sub lignaj krucoj kuŝas monaĥoj kaj ankaŭ monaĥinoj de la monaĥinejo Lintula kelkaj kilometroj de Valamo.

Venis la lasta tago de la kurso. Estis la tago por adiaŭi sed ankaŭ la tago de la ŝipvojaĝo de Valamo al Arta Lumo en Kuopio. La vojaĝo daŭris kvar horojn tra bela pejzaĝo. Kaj la suno brilis. En la haveno de Kuopio aliaj esperantistoj bonvenigis nin kaj ni kune piediris al la tranoktejoj. Poste okazis interkona vespero.

EAF festis cent jarojn 2007. Unu grava okazaĵo estis la Festivalo Arta Lumo. EAF reklamis la festivalon per invito “por kune ĝui niajn artajn kreaĵojn, la varian Esperantokulturon kun la plej bonaj muzikistoj, verkistoj kaj aliaj artistoj en ĉarma ĉelaga urbo.” Partoprenis en la festivalo ĉirkaŭ kvardek esperantistoj plus la artistoj. Al la koncertoj ankaŭ loĝantoj de la urbo estis bonvenaj. La ejo de la festivalo estis la moderna muzikcentro en Kuopio kaj ĝi estis tre taŭga.

Inter la finnoj Anja Karkiainen gvidis literaturajn programojn, koncertis la esperantorokbando Dolchamar, prezentis Markku Sarastamo sian artan ekspozicion. Prelegis pri literaturo la fama redaktoro de la Ondo Aleksander Korĵenkov el Kaliningrad. El la sama urbo venis la juna kantistino Natalia Striĵnova. Franca paro Francoise Rochette kaj Patrick Delaby bone ludis gitaron kaj akordionon, kantis kaj dancis. Ilia arta nomo estas Duoble Unu. Hispano kun la arta nomo Solo prezentis tre ŝatatan ĵazkoncerton. Pri koncerto de orgena improvizado en nova preĝejo en la urbo ni ankaŭ estis tre kontentaj. Ludis Esa Toivola. ▷

**Karavano al la 93-a UK en Roterdamo somere 2008**  
**Karavaani UEA:n juhlavuoden kongressiin 2008**

## BR4 – Buse al Roterdamo – Bussilla Rotterdamiin

Denove okazos Universala kongreso en Eŭropo en tia distanco ke ni povus pensi vojaĝadon per propra aŭtobuso. La sekretario de Esperanto-Asocio de Finnlando, Tiina Oittinen, informiĝis pri ebleco vojaĝi al Roterdamo kaj ricevis jenan oferton de okcidentfinnlanda buskompanio Launokorpi. Se interesas vin kunvojaĝi, aliĝu provizore al ŝi, kontaktinformojn sur paĝo 2. Ekzemplon pri la vojaĝo vi vidos en la finnlingva parto.

Monet varmaan muistavat yhteisen bussimatkamme Vilnaan pari vuotta sitten? Olisiko nyt kiinnostusta lähteä bussilla Rotterdamiin, kun kongressi taas on sopivan matkan päässä Euroopassa. Liiton sihteeri Tiina Oittinen on saanut seuraavan tarjouksen kemiöläiseltä bussifirmalta, Launokorpi Oy:ltä. Jos matka kiinnostaa, ota yhteyttä ja ilmoittaudu alustavasti. Sihteerin yhteystiedot ovat sivulla 2.

Seuraavassa on yksi esimerkki, miten matkan voisi ajatella menevän:

17.7.2008 Tku-Sto Viking Linen iltalaivalla

18.7.2008 Ajo Ruotsin halki Trelleborgiin,  
josta TT-Linen laiva lähtee klo 22.00  
Travemünde

19.7.2008 Saapuminen klo 07.30

Travemünde. Ajo Rotterdamiin, jonne saapuminen noin klo 16-17 iltapäivällä.

19.-26.7. Rotterdam, hotellimajoitus

26.7. Lähtö Rotterdamista aamulla. Ajo illaksi Travemünde, josta TT-Linen laiva lähtee Trelleborgiin klo 22.00.

27.7. Saapuminen aamulla Ruotsiin. Päivän aikana ajo Tukholmaan, josta Viking Linen iltalaivalla Turkuun.

28.7. Turussa aamulla

Matkan arvioitu hinta 30 henkilön mukaan tämän hetkisten tietojen perusteella olisi noin 690 e/hlö (laivamatkat 4-hengen hyteissä) tai 770 e/hlö (2-hh hyteissä). Hintaan sisältyy bussimatkat, laivamatkat sekä hotelliyöpymiset Rotterdamissa. Rotterdamin hotellimajoitus kolmen tähden hotellin mukaan. – Voimme myös ajatella yöpymistä hotellissa matkan varrella; mikäli se on useimpien mielestä parempi vaihtoehto.

Bonvenon al la karavano BR4 – Tervetuloa yhteiselle bussikaravaanimatkalle!

*por EAF-estraro, Tiina Oittinen*

---

▷ Eble la pinto de la festivalo estis kantela koncerto kun danco. Mi citas el la programo: “Timo Väänänen, la evoluiginto de la elektra kantelo, malkaŝas novajn dimensiojn de la kantelo kun la dancistino Päivi Järvinen. La koncerto bildigas la kantelon de la nuntempo en komunikado kun la tradicio, kiu levis ĝin al la statuso de nacia instrumento”.

Lundon estis duontaga saŭno-ekskurso al la

kamparo. Ni estis en fumsaŭno kaj poste naĝis en la rivero. Ni manĝis rostitajn kolbasojn, trinkis bieron kaj kafon kun kiu estis bongusta torto. Amuzis nin la Duobla Unu. La vespero estis hela, varma kaj bela.

Mi volas danki ciujn organizantojn pro bonaj ferioj en Valamo kaj en Kuopio la someron 2007.

*Kerstin Kristoferson*

## Valamo 2008 – ĉu denove sugestopedia kurso?

Ventontjare la somera esperantokurso en Popola Instituto de Valamo okazos 23.-27.6. tuj post la mezsomera semajnfino. La kurso estos aranĝita kunlabore kun la Instituto en Valamo kaj EAF. La ĉefinstruisto estos Atilio Orellana Rojas kaj la kursogvidanto/helpinstruisto Tiina Oittinen kun eventuala dua finnlingva instruisto.

Ni ricevis fortan deziron aranĝi denove sugestopedian kurson. Tiajn ni ja havis por la daŭrigantaj studentoj dum la kursoj en Valamo 2002 kaj 2004. Atilio estas sperta instruisto ankaŭ en tiu kursoformo.

### Kia estas sugestopedia kurso?

Dum sugestopedia kurso ĉiuj gelernantoj kaj la instruisto ludas iun rolon. Ĉiu lernanto ricevas informojn pri sia nova personeco kaj rakontas aferojn tiurilate kadre de imagitaj situacioj. Okazas ekzemple etaj dialogoj inter la partoprenantoj. La gramatikaĵoj estas ofte ripetitaj en diversaj formoj. Okazas ankaŭ ripozaj momentoj kiam la gelernantoj lernas nur aŭskultante la voĉon de la instruisto. La atmosfero dum la kurso estas afabla kaj senstrecata.

### Por kiuj tauĝas?

La sugestopedia kurso estas celita al gelernantoj kun bazaj scioj de la lingvo. Ideale estus, se ĉiuj estas pli-malpli en la sama nivelo, sed ĉio funkcias eĉ se kelkaj estas pli parolemaj ol la aliaj. Puraj komencantoj tamen ne povos kunesti, necesas do almenaŭ 1-jara studado de Esperanto.

### Limdato por aliĝoj

La sugestopedia kurso bezonas antaŭlaboron de la instruisto. Krome por havi sukcesan tiatipan kurson necesas almenaŭ 9 kursanoj. Tial ni petas vin, kiuj deziras, ke la kurso estu sugestopedia, aliĝi plej laste ĝis fino de januaro. Informu al Tiina, ke vi dezirus partopreni en la sugestope-

dia kurso. Tiina peras vian aliĝon al Valamo. Kompreneble, se vi deziras pli detalajn informojn pri la kurso, Atilio estas je via dispono.

### Komencantoj kaj ne-sugestopedia daŭriganta kurso

Valamo-kurso estos aranĝita ankaŭ por komencantoj. Se venos multaj gelernantoj, ni havos finnlingvan instruiston por la elementa grupo. Kaj kvankam Atilio gvidus la daŭrigantan grupon sugestopedie, li havos kelkajn lecionojn ankaŭ kun la elementanoj. Notu, ke se la sugestopedia kurso ne realiĝos ĉi-foje, ni havos samtipan daŭrigantan kurson kiel ĝis nun. Se pli plaĉus al vi la ordinara kursotipo, bonvolu sciigi tion al ni. Dum la kutima kurso oni studas tekstojn, lernas gramatikaĵojn ofte en amuza maniero kaj diskutas pri ĉioebla en la mondo. Necesas minimume naŭ gelernantoj (ĉiuj kursonive- loj kune) por entute aranĝi la kurson. Se aliĝos dudeko da kursanoj, eblos havi duan finnlingvan instruiston por instrui en ĉiuj kursonive- loj kunlabore kun la ĉefinstruisto kaj kursogvidanto.

### Vizitu la monaĥejan areon de Valamo

Eblos ankaŭ venontsomere viziti en Valamo dum la kursosemajno por du tagoj: alveno posttagmeze ĵaude, partopreno en festa vespermanĝo kun la kursanoj kaj konatiĝo kun la monaĥeja areo. Kiel kursogvidanto Tiina zorgos pri la programo ekster la lecionoj kaj donas bazajn konsil- ojn ankaŭ al la vizitantoj.

### Viaj deziroj bonvenaj

Rakontu al ni viajn dezirojn por la somera kursosemajno, kontaktinformoj de Tiina Oittinen vi trovas en paĝo 2. Pliaj informoj pri la aranĝoj en Valamo estos en sekvaj numeroj. Sekvu ankaŭ niajn sciigojn en *www.esperanto.fi*.

Bonvenon novaj kaj malnovaj valamo-anoj!

*Tiina Oittinen*

## **Aktoj de la Vilna Esperantologia konferenco aperis**

Sub la titolo "Lingvaj kaj historiaj analizoj" aperis la aktoj de la 28-a Esperantologia Konferenco, kiu okazis en la UK en Vilno en 2005. Krom enkonduko de d-ro Detlev Blanke aperas la tekstoj de ĉiuj ses prelegoj kun resumoj en Esperanto kaj la angla: Oksana Burkina el Rusio ("Rimarkoj pri la prononca normo en Esperanto"), Aida Cizikaite el Litovio ("Uzo de refleksivo en la litova, Esperanto kaj kelkaj aliaj romandevenaj lingvoj"), Toon Witkam el Nederlando ("La ekscito de vortstatistiko: kiel krudforta kunmet-analizo kompletigas tekstkontrolo"), Sebastian Moret el Svislando ("Esperanto aŭ fremdaj lingvoj? Diskutadoj en Sovetlando 1920-1930"), Christian Lavarenne el Francio ("La katolika eklezio kaj Esperanto: kelkaj novaj faktoj"), kaj Andreas Kuenzli el Svislando ("Metologiaj aspektoj en la projekto Svisa Enciklopedio Planligva").

ISBN 978 92 9017 098 3, grandformata kaj plaste kovrumita, 92 paĝoj. Prezo ĉe la Libroservo de UEA 12,00 eŭroj plus sendokostoj kaj imposto 6%.

*(el komunikado de UEA koncizigis mm)*

## **Malferma Tago kaj rearanĝoj en CO**

La konata Esperanto-historiisto d-ro Ulrich Lins prelegos dufoje en la Malferma Tago de la Centra Oficejo de UEA sabaton, la 24-an de novembro. Unu prelego traktos la staton de esploroj pri L.L. Zamenhof, dum la alia rilatos pli proksime al la historio de UEA. En la programo estos ankaŭ aliaj prelegoj, libroprezentoj kaj filmoj. La vizitantoj povos profiti de rabatoj en la libroservo kaj gajni esperantaĵojn en senpaga loterio. Kafo kaj teo, ankaŭ senpagaj, estos varmaj la tutan tagon de la 10-a ĝis la 17-a horo.

Rearanĝo de la stabo fariĝis necesa pro la for-

paso de la longtempa oficisto Marvin H. Stanley. Ekde la 1-a de novembro la sekretario de la CO, Ralph Schmeits, laboros en la librotena fako. S-ro Schmeits, kiu estas nederlandano kaj naskiĝis en 1979, estas oficisto de UEA ekde novembro 2005. La postenon de oficeja sekretario la 1-an de decembro transprenos Katarzyna Marciniak, kiu ekde novembro 2006 laboras kiel volontulo de TEJO. Ŝi estas el Pollando kaj naskiĝis en 1978. La Estraro de TEJO elektos novan volontulon.

*(el komunikadoj de UEA koncizigis mm)*

## **Funkciuloj de UEA vizitis Bjalistokon**

La Ĝenerala Direktoro de UEA Osmo Buller kaj la Konstanta Kongresa Sekretario Clay Magalhaes faris laborviziton al Bjalistoko la 11-an kaj 12-an de oktobro. La 94-a Universala Kongreso de Esperanto en 2009 okazos tie por prifesti la 150-an datrevenon de la naskiĝo de L.L. Zamenhof. Konfirmiĝis la favora sinteno, kiun Esperanto kaj la okazigo de UK ĝuas ĉe la aŭtoritatoj de la naskiĝurbo de Zamenhof kaj kiu manifestiĝis en la Jokohama UK per la elpaŝoj de la urbestro, d-ro Tadeusz Truskolaski. Li kaj Osmo Buller donis gazetaran konferencon, en kies komenco Buller transdonis al la urbestro specialan diplomon pri lia elekto kiel "Amiko de Esperanto" rezulte de voĉdonado de la reta gazeto "Freŝo".

La funkciuloj de UEA diskutis pri UK-preparoj ankaŭ kun vicurbestro Aleksander Sosna kaj konatiĝis kun turismaj entreprenoj kaj la ejoj de la ĉefa kongresejo. En la densa programo estis ankaŭ multnombre vizititaj prelegoj al studentoj. Osmo Buller parolis en la historia fakultato de la Bjalistoka Universitato pri la historio de UEA kaj UK-oj. Grandan intereson elvokis la prelego de Clay Magalhaes al studentoj de turismiko en la Teknika Universitato pri la organizado de UK-oj kaj ĝiaj specifaĵoj kompare kun aliaj internaciaj kongresoj. La prelegon de



Magalhaes antaŭis prelego de prof. Halina Swieczkowska pri filozofiaj aspektoj de planlingva kreado.

En kunsido kun profesorino Hanna Konopka, prezidanto de la Komitato de Fondumo Zamenhof, oni traktis la funkciadon de la Fondumo kaj ĝiajn planojn por estonteco. Verŝajne la Fondumo baldaŭ ricevos propran ejon por starigi Zamenhof-muzeon, ekspozicion, bibliotekon kaj esplorojn pri Esperanto kaj interlingvistiko.

*(el komuniko de UEA koncizigis mm)*

### UEA-estraro dividis taskojn

La membroj de la nova Estraro de UEA, elektita en la UK en Jokohamo, decidis pri disdivido de ĉefaj respondecoj. Prezidanto Probal Dasgupta respondecas pri kunordigo kaj ĝenerala planado de la agado. Vicprezidanto Ranieri Clerici gvidos la eksterajn rilatojn de la Asocio, dum la reelektita alia vicprezidanto Claude Nourmont plu respondecas ankaŭ en la nova Estraro pri edukado, kulturo kaj kongresoj. Barbara Pietrzak okupiĝos, krom pri kutimaj taskoj de ĝenerala sekretario, ankaŭ pri informado. Loes Demmendaal estas estrarano pri financo kaj administrado. Pri landa kaj regiona agado respondecas Hori Yasuo, dum Jose Antonio Vergara ekgvidas la fakan kaj scienca agadon de UEA.

*(el komuniko de UEA prenis mm)*

### Simbolo por 100-jariĝo de UEA

19 aŭtoroj aŭ aŭtoraj duopoj el 12 landoj partoprenis la konkurson pri simbolo por la 100-jariĝo de UEA, festota en 2008. Deklarante la konkurson la Estraro de UEA deziris, ke la simbolo “emfazu la 100-jaran historion de UEA kaj la aktualecon de ĝiaj celoj kaj idealoj”, kaj ke ĝi estu “elvoka, laŭeble simpla kaj uzebla presite kaj elektronike”.

La malnova estraro selektis kvin proponojn por la “finalo”, lasante la finan decidon al la

nova estraro, elektita en Jokohamo. Tiu ĉi unuanime juĝis al venko la verkon de Guillem Sevilla, 24-jara grafika dezajnisto el Barcelono.

Guillem Sevilla klarigas, ke la simbolo emfazas “per simpla kaj aktuala aspekto la tut-teran disvastiĝon de la neŭtrala lingvo Esperanto” kaj “subtile rilatiĝas al tradiciaj esperantismaj identigiloj (stelo), sed uzas ankaŭ eksterajn identigilojn (parolvezikoj, kvin koloroj) rekoneblajn de la publiko, kiu ne konas la esperantistan heraldikon”. La elektita emblemo ne havas unu fiksan formon, sed “temas pri fleksebla identiga sistemo kun senfinaj potencialaj variantoj”.

Elŝuteblaj variantoj estas ĉe <http://www.uea.org/dokumentoj/simbolo/>.

*(el komuniko de UEA koncizigis mm)*

### Finfine decido pri Junulara Kongreso

En 2008 – de la 26-a de julio ĝis la 2-a de aŭgusto – IJK, jam la 64a, okazos en la romia hungara urbo Szombathely, je kelkaj km de la aŭstria landlimo. La aranĝo kunligos la tradicion de la IJK – ekz. gravaj debatoj en pleno kaj diskut-rondoj (ĉefe pri la ĉefa temo de IJK: minoritataj rajtoj) – kune kun la kutima juneca etoso, en kiu brilos sportoj, akvobatalo, dancoj, ekskursoj, naĝado ktp. Ĉio tio en la esperantista klimato de internacia amikeco sen lingvaj problemoj.

Por pliaj informoj kontaktu la oficialan retpaĝon de la 64a IJK ĉe <http://esperanto.net/ijk2008>

*(el gazetara komuniko de IJK)*



## Aŭtunaj Tagoj en la Ostrobotnia ĉefurbo

Urbo Vaasa estas tiel grava centro de la provinco Ostrobotnio, ĉeborda areo ĉirkaŭ la mezo orientflanka de Botnia Golfo de Baltmaro, ke ĝia nomo dum duono de la car-rusa periodo finnlanda estis Nikolaj-urbo, ĉar Vasa estis nomo de sveda dinastio (la urbanoj ja ne obeis la ŝanĝon). Kiel centro de dulingva provinco, Vaasa estis ideala loko por niaj Aŭtunaj Tagoj kun la temo de praktika plurlingvismo.

La vasta, moderna, bonaranĝita centra biblioteko de Vaasa estis la ejo de la ĉefa el niaj Aŭtunaj Tagoj, sabato 6.10. Okazis Lingva Festivalo kun kontribuajoj de AT-anoj pri lingvoj finna kaj sveda kun dialektoj, germana, luksemburga, okcitana (ĉu vi sciis?), araba, berbera... Esperanto estis prezentita. Estis prelego pri la traduka

kaj interpreta sistemo kaj servo en Eŭropa Unio, fare de Brian Moon.


La sabatan fruvesperon nin akceptis urbo Vaasa fare de vicurbestrino Kristina Stenman. Paroladoj simpatiis kaj mallongis, kaj vespermanĝo bongustis kaj longis ... La vespero daŭris kun koncerto de JoMo en la biblioteko. Certe iu kalkulis la nombron de la lingvoj en la repertuaro, kiu kalkulis kaj notis, sciigu!

La dimanĉa ekskurso konigis al la AT-anoj, ke Vaasa troviĝas en la nuna loko de 155 jaroj; tiam brulis la urbo tiam dekon da kilometroj oriente de la nuna. – La ekskurso atingis la muzean areon Stundars, kie ni konatiĝis kun la kampara vivo de la meza 19-a jarcento.


*Tuomo Grundström*




*Vicurbestrino Kristina Stenman simpatie parolis, prezidantino de EAF Anna Ritmäki reciprokis, kaj Tuomo Grundström trilingve interpretis.*



*Kelkaj gastoj neesperantistaj vizitis niajn programerojn. Tuomo klarigas pri Esperanto al Rigden Stubb de Korsholm.*



*Nia laboranto flanke de la biblioteko estis la civilservulo (laboras 13 monatojn en civila institucio anstataŭ militservaj 6 monatoj!) estis Saska Wilhelmsson, al kiu dankas la Aganto de la Jaro, lernu!-aktivulo Teuvo Alavillamo (maldekstre) kaj Tuomo Grundström (dekstre).*



*JoMo, Jean-Marc Leclercq, troviĝas en la Libro de Rekordoj (Guinness) kiel la plej multlingva trobadoro. En Vaasa li eble ne atingis sian rekordon, sed certe rekordis en la amuzado de nia esperantista popolo.*

## Lingvoelektoj – tutmondaj, organizaj kaj personaj

La realigon de la temo “Finnlando, Esperanto kaj pluraj lingvoj praktike” kiel traktita dum la unua simpozia tago, vendredon la 5an de oktobro, en la universitato de Vaasa povas resumiĝi kiel analizo de lingvoelektoj je diversaj sociaj niveloj. Mi startis la seminarion per rapida enkonduko al interlingvismo, ilon por analizi lingvoelektojn je tutmonda nivelo.

La esploristoj Mark Fettes kaj Jonathan Pool de *Esperantic Studies Foundation* prezentas kvin skemajn strategiojn per kiuj la mondaj agantoj aliras la defiojn de nia multlingva mondo: Mond-Anglismo, Plurlingvismo, Lingvaj Perantoj, Teknikismo kaj Esperantismo. Tamen, ne-

niu el tiuj kvin strategioj plene respondas al la kvin kriterioj por la alstrebata interlingvisma mondo: Diverseco, Egaleco, Integriĝo, Efikeco kaj Stabileco.

En “Lingva Prismo – paĝaro por kaj pri lingvoj” (*lingvo.info*) estas prezentiĝo de interlingvismo en kiu ĉiu povas doni siajn taksojn pri la kvin strategioj laŭ la kvin kriterioj. Lingva Prismo troviĝas ankaŭ en la finna: Lingva prismo – sivusto kielistā ja kielten puolesta. *Esperanto @Interreto*, la organizo malantaŭ i.a. Lingva prismo kaj Lernu.net, evoluigis sistemon per kiu multlingvigo de retpaĝoj estas facile realigebla.



*Niaj eksteraj prelegantoj Hannele Saloranta kaj Karita Mård-Miettinen ricevis la novan libron Doktor Zamenhof och det internationella språket. (Ĝi estas aĉetebla de EAF.)*

## Esperanto kaj lingvopolitiko

Jukka Pietiläinen, doktoro de sociaj sciencoj kaj komitatano de UEA, analizis la evoluon de la ideologiajn sintenojn sub la temo “Ĉu la esperantomovado estas lingvopolitika?” Speciale la sinteno al lingva diverseco variis tra la epokoj. Lingva egaleco tamen estas daŭra idealo. Pietiläinen notis ekzemplon de porlingva kampanjo de aliaj agantoj, alvokon por la maria lingvo, kiu aperis en multaj lingvoj, tamen ne en la maria mem. Por esperantisto estus tute nature aranĝi uzon de la minoritata lingvo.

Brian Moon, tradukisto al la angla ĉe la Eŭropa komisiono, prezentis la lingvan realecon en la EU-administrado. Pli kaj pli la angla servo tradukas tekstojn por la interna uzo, ekz. petojn de civitanoj. Nun la plej multaj tekstoj estas verkitaj en la angla kaj tial la plej multaj tekstoj tradukitaj de la aliaj lingvoservoj estas tradukitaj el la angla. Moon defendas la kostojn por multlingveco, ĉ. 2 eŭroj por ĉiu civitano: Ne malaltigo de kostoj povas esti la motivo por vastigi la uzon de esperanto, sed per la uzo de esperanto oni povus per la sama sumo atingi plian efikecon kaj plian egalecon en la realigo de la multlingveco.

## Du kaj pli da lingvoj praktike

Hannele Saloranta, informa direktoro, de Vaasa prezentis la lingvan situacion de la urbo, kiu havas loĝantaron de ĉ. 58 000. 71 procentoj estas registritaj kiel finnlingvanoj, 25 procentoj kiel svedlingvanoj kaj 4 procentoj, pli ol 2 500 personoj, notis alian lingvon kiel sian gepatran. La retpaĝoj de la urboj estas konstruitaj tiel ke la finn- kaj svedlingvaj paĝoj estu identaj kaj laŭeble kompletaj, la alilingvaj enhavantajn bazajn ne same ofte ĝisdatigatajn informojn. Vaasa apartenas al la gubernio Ostrobotnio, kiu estas la sola dulingva gubernio kun svedlingva majoritato en Finnlando.

Karita Mård-Miettinen, esploristo pri lingvobanado en la finnlingva universitato *Vaasan yliopisto*, prezentis la lingvobanan pedagogion.

Christer kaj Ulla Laurén enkondukis la lingvobanan pedagogion en Finnlando laŭ kanada modelo. Post la starto en Vaasa en 1987 la metodo disvastiĝis al aliaj urboj. Lingvobanado estas ofertata al infanoj de la lingva majoritato. La ĉefa formo estas frua kaj plena lingvobanado. La finnlingvaj infanoj povas kiel 5-jaraj partopreni lingvobanan infanĝardenon, poste lernejon. La instrua lingvo estas nur la sveda, sed la instruistoj komprenas ankaŭ la finnan. En la lernejo la instruado realiĝas ĉefe per la sveda, sed la finna estas iom post iom pli kaj pli uzata ĝis duono de la instruado okazas en la du lingvoj. Nun en Finnlando ĉ. 6000 lernantoj ricevas lingvobanadan instruadon.

La simpozio realiĝis trilingve. La ĉefa metodo estis postsekva interpretado, sed ankaŭ flustra tradukado (al esperanto dum la finnlingva parolado de Pietiläinen), materialo en la finna (powerpoint), parolado en la sveda estis uzita (Mård-Miettinen, tamen ankaŭ postsekva parolado), miksita parolado ĉefe sveda kaj esperanto (Ritamäki) kaj divido laŭ lingvo (laborgrupa diskutado) estis utiligitaj.

*Anna Ritamäki*

## Ĉiutagaj elektoj en tri grupoj

Sufiĉe glate la partoprenantoj de la simpozio diskutis siajn ĉiutagajn lingvajn elektojn en grupoj, sendepende ĉu ili parolis sian propran lingvon aŭ iun fremdan. Al ĉiu grupo la diskutlingvo estis malsama: esperanto, la finna aŭ la sveda. Do, la unua lingva elekto estis la grup-elekto.

La anoj de la finna grupo elektis por si la plej bone konatan lingvon. Ili konstatis ke tamen iam oni bezonas la duan lingvon de Finnlando, la svedan. Povas esti amikoj kiuj preferas la svedan, aŭ la laboro postulas konon de ambaŭ lingvoj. Iu travivis la lingvoŝanĝojn kiel militinfano en Svedio. Ankau iuj spertis ke ili devas kompreni la svedan studante siajn radikojn kiam tiuj ▷

iras al malnova tempo. Pri lernado de lingvoj dum infanaĝo oni ne mem elektas, sed la gepatroj faras la decidojn.

En la sveda grupo estis la malofta situacio ke unu svedlingvano kun kvin finnlingvanoj interparolis svede. La plej multaj elektis ĝin simple ĉar ĝi estis la plej malgranda aŭ por trejni sin. Kelkaj bezonas ambaŭ lingvojn en sia laboro, aŭdas la svedan en sia urbo aŭ havas familiajn rilatojn. La rolo en kiu oni estas influas. Plej ofte oni kun certa persono parolas la lingvon kiun oni iam elektis. Estas malfacile ŝanĝi sian kutimon.

La esperanta grupo estis la plej granda. Kelkaj elektis ĝin simple ĉar ili ne regas la finnan nek la svedan, aliaj ĉar ili volas paroli esperanton dum esperantokunveno. Se estas diversaj elektobloj oni plejofte elektas laŭ persono sed ankaŭ por subteni iun lingvon, ekz paroli la okcitanan kun ĉiuj kiuj regas ĝin. Iam oni elektas laŭ la plimulto aŭ respektas unu kiu ne regas tiun lingvon. Iam oni pro privateco elektas lingvon kiun la aliaj ne komprenas.

Ĉiuj grupoj ankaŭ faris liston pri gravaj vortoj kiujn oni lernu por restado en fremda lando. Povas esti bezono rakonti pri sia malsato, demandi pri la vojo kaj pri la tempo. Por parolado kun novaj konatuloj indas lerni prezenti sin kaj de-



mandi la nomon kaj adreson de la konatulo. Por esti ĝentila oni lernu la vortojn por Dankon, pardonu min kaj bonan tagon. Kiam oni ricevas respondon estas bone koni la frazon “Mi ne komprenas”. Utilaj vortoj estas ankaŭ “jes” kaj “ne” kaj la numeroj. Kiel eta serĉo oni ankaŭ proponis la frazon: “Mi amas vin”. Tiu ja estas unu el plej ofte pride-manditaj frazoj.

Ĉiuj partoprenantoj kune helpe de esperanto havis dum la renkontiĝo ŝancon paroli kun personoj kiuj parolas almenaŭ dek kvin lingvojn krom la jam menciitajn.

*Carola Antskog*



## Malfermaj pordoj en la oficejo en Helsinki

15.12.2007 je 12a-17a horo

Esperanto-Asocio de Finnlando havas la plezuron elkore inviti ĉiujn esperantistojn el Finnlando viziti sian propran ejon en Helsinki. Volonte kunprenu viajn geamikojn sendepende ĉu ili jam konas la fenomenon Esperanto aŭ ne!

La Asocio ofertas al vi artaĵojn de du famaj finnlandaj esperanto-artistoj: Anja Karkiainen kaj Patrik Austin. Ili amuzos vin per poemoj kaj kantoj: ili mem deklamas, kantas kaj ludas kaj vokas vin kunkanti kaj -deklami. Por varmigi nian ĉeeston la Asocio regalas vin per jultempaj dolĉaĵoj: tradician trinkaĵon "glögi" kaj tradiciajn spickuketojn "piparkakut". Vi povos diskuti kaj babili unu kun la alia kaj konatiĝi kun ĉiuj anguloj de la oficejo: la biblioteko certe vekos vian intereson en la tago de la libro – eble ankaŭ la vendataj libroj.

Bonvenon la 15an de decembro, 2007 (148-a naskiĝtago de Ludoviko Zamenhof)!

*Estraro*

## Avoimet ovet Suomen Esperantoliiton toimistossa Helsingissä

15.12.2007 klo 12-17

Liiton hallituksella on ilo ja kunnia kutsua kaikki Suomen esperantonharrastajat jälleen Helsinkiin: juhlavuoden viimeinen virallinen tapahtuma on toimiston avoimien ovien päivä. Mukaan voi mielellään ottaa myös esperantosta kiinnostuneita ystäviä.

Päivän ohjelmasta huolehtivat maailmalla tunnetut esperantotaiteilijamme Anja Karkiainen ja Patrik Austin: tiedossa on runoja lausuttuna ja laulettuna sekä kitaramusiikkia. Yhteislaulukin onnistuu. Jouluaikaan sopien on tarjolla glögiä ja pipareita, toki myös kahvia ja teetä.

Tule tapaamaan ystäviä ja tuttavuuksia sekä tutustumaan liiton toimistoon, mm. sen lukuisiin kirjoihin. Päivä on muuten esperantokirjallisuuden päivä sekä L.L. Zamenhofin syntymäpäivä, hän on syntynyt Białystokin kaupungissa 15.12.1859.

*Tervetuloa!*

*Hallitus*



## Jyväskylän toimintaa

Sepänkeskuksen Happi-kokoustilassa joka toinen keskiviikko klo 16.30-19.00:

Tämän syksyn ja talven opintopiirin (alkoi 19.9.) teemana on *Norda Prismo – Pohjolan kansojen kirjo*. Kaikki kiinnostuneet ovat tervetulleita. Kunkin illan alustukset hoidetaan esperanton kielellä, mutta keskusteluun voi osallistua myös suomen kielellä.

ke 28.11. Yhdistyksen syyskokous

ke 12.12. Opintopiiri Norda Prismo jouluisen tarjoilun kera

(el *Tintileto redaktis mm*)

## Okazadas en Tampere

Klubvesperoj de Antaŭen okazas en Nesto adrese Satakunnankatu 30 C 6. Komenco je la 17a, la pordoj fermiĝas aŭtomate je la 18a.

10.12. Juleta festo

Pensiula Esperanto-grupo de ETY en Nesto ĉiun duan merkredon je 11.30–13.00.

(el *Vekilo kompilis mm*)

## Okazadas en Turku

Renkontiĝoj ĉiun merkredon en kafejo Sirius de la nova ĉefbiblioteko je 16.30. Oni legas la libron *Vivo de Zamenhof* de Edmont Privat.

Jula festo 18.12. je 16.30–18.30 en Blua Salono de la Malnova urbodomo.

(*mm*)

---

## Fabelkonkurso, rezultoj 2007

### Kategorio A, malpli ol 9-jaraĝaj

1. *La malbona suno*, Chiara Goethals, Belgio

### Kategorio B, 9-10-jaraĝaj

1.-

2. *Merlo Joĉjo*, Michaela Hanusova, Ĉeĥio

3. *Leporeto*, Dominika Svendova, Ĉeĥio

### Kategorio C, 11-13-jaraĝaj

1. *Draketo*, Katka Morkesova, Ĉeĥio, Fabelo Internacia

2. *Bestpiedeto*, Zagneta Jandourkova, Ĉeĥio

3. *Kiu nenion scias, tiu al nenio timas*, Eliska Splichalova.

Partoprenis 11 konkursaĵoj al ĉi-jara fabelkonkurso. Fabelfesto okazis en Hotelo Herkko en Taivalkoski. Partoprenis 850 fabeloj al finlingva konkurso, 10 konkursaĵoj al samealingva konkurso.

*Aini Vääräniemi*

---

## Talvipäivät 2008 – Vintraj Tagoj 2008

Suomen Esperantoliiton talvipäivät ja vuosikokous järjestetään pääkaupunkiseudulla maaliskuussa 2008. Ohjelmassa on mm. paljon juhluvuoden muisteluja. Luennoitsijat ja muut ohjelmantekijät tulevat todennäköisesti jäsenistömme piiristä. Sopivimmasta ja helpoimmin tavoitettavasta kokouspaikasta päättää liiton hallitus marraskuun kokouksessaan. Päivien tiedot ilmoitautumislomakkeineen ilmestyvät Esperantolehden joulukuun numerossa sekä nettisivuilla ja EAF-agadas sähköpostilistalla. Tervetuloa aktiivisesti mukaan myös ensi vuonna!

Vintraj tagoj kun jarkunveno de Esperanto-Asocio de Finnlando okazos marte 2008 en la ĉefurba regiono. En la programo estos i.a. multaj memoraĵoj pri la jubilea jaro. La prelegantojn kaj aliajn programfarantojn ni invitos plej verŝajne ene de nia propra membraro. La plej taŭga kaj facile atingebla loko estas ankoraŭ serĉata. Ni informos pri detaloj de la aranĝo en decembra numero de Esperanta Finnlando kaj rete en EAF-agadas-listo kaj en niaj TTT-paĝoj. Estu aktivaj partoprenantoj ankaŭ venontjare!

*Hallitus – Estraro*



# Esperantotaidetta heinäkuussa Kuopiossa

Kuopion Festivalo Arta Lumo sai huomiota eniten paikallisissa lehdissä, Iisalmen Sanomien Tänänpalstalla 26.7.2007 ja Sisä-Savon Sanomissa 2.8.2007. Se ilmestyy Suonenjoella ja leviää viiden lähipitäjän alueelle.

Iisalmen Sanomissa haastateltiin Reino Eriksonia ja Onni Kauppista. Ensin mainittu oli opettajana esperantokurssilla, jolla jälkimmäinen opetteli kielen 1974. Reino tosin sanoo, että Onni osaa nyt paremmin kieltä kuin hän. Onni käyttää sitä päivittäin, kun Reino Eriksson oli taas 1970-luvulla aktiivinen esperantisti. Onni Kauppisen luona käy runsaasti esperantisteja muualta maailmalta.

– Nyt olemme ukkoutuneet ja mummoutuneet, mutta 70- ja 80-luvuilla Iisalmi oli kansainvälisestikin merkittävä esperantopaikkakunta, sanoi Reino.

– Olen käynyt yli 40 maassa, joissa en varmasti olisi käynyt ilman esperantoa, sanoo Onni Kauppinen. Minulla on läheisiä ulkomalaisia ystäviä.

Iisalmen Sanomien mukaan Kuopion Festivalo Arta Lumo -tapahtumaan matkustetaan maailmalta, kun tapahtumalla juhlistetaan Suomen esperantoliiton 100-vuotista olemassaoloa. Myös Reino, Onni ja 11 muuta Iisalmen esperantokerhon jäsentä osallistuivat Kuopion juhlaan. Iisalmen esperantistit kokoontuvat joka toinen kuukausi kertomaan kuulumisiaan omassa tapaamisessaan.

Lehdessä oli lyhyt esperanton esittely, jossa kerrottiin kielen synnystä ja sen käytöstä tänä päivänä. Myös web-sivu [www.lermu.fi](http://www.lermu.fi) mainittiin. Jutun kuvassa Reino Eriksson ja Onni Kauppinen poseerasivat esperanto-lipun kanssa.

Sisä-Savon Sanomissa raportoitiin Festivalo Arta Lumon retkestä Vesannon Syvälahden

pajutilalle. Paikalle tuli yhdeksän eri kansalaisuuden edustajat.

– Halusimme tarjota vieraille saunaillan ja siihen liittyen maaseutumatkailutapahtuman. Pajutilalla sai myös esperantonkielisiä palveluja. Retkeläiset kävivät Rautalammilla savusaunassa Korholan tilalla, kertoi EAF:n sihteeri Tiina Oittinen.

Esperantoliiton puheenjohtaja Anna Ritämäki innostui esperantosta 17-vuotiaana partiolaisena. Äidinkieleltään ruotsinkielisenä Anna sanoi esperanton opettelemisen olevan helpompaa kuin suomen kielen. Täydellisen esperanton puhujia on kuitenkin vähän. Kieltä käyttäessä oppii koko ajan uutta, sanoi Tiina Oittinen. Tällä matkalla piti miettiä sanastoa, jotka liittyivät mm. mansikan viljelyyn ja hirviin, joista puhuin matkan aikana.

Jutun kuvituksena oli valokuva retkeläisistä, jotka ovat kokoontuneet katsomaan, miten ranskalainen Francoise koittaa soittaa sahaa.

Savon Sanomissa (27.7.2007) ja Kuopion kaupunkilehdessä (26.7.2007) oli Festivalo Arta Lumon esittely ja maininnat sen ohjelman tärkeimmistä kohdista. Savon Sanomissa mainittiin Markku Sarastamon akvarellit, Duoble Unu ja Solo -yhtyeiden konsertit sekä Timo Väänänen ja Päivi Järvisen kannel-tanssi -esitys. Tapahtuma liittyi Suomen Esperantoliiton 100-vuotisjuhlaan.

Italialaisessa Regiongazeto de Abrucossa (20.7.2007) julkaistiin italiaksi juttu Festivalo Arta Lumosta. Sama teksti on luettavissa italian kielellä [www.primadanoi.it/modules/bdnews/article.php?storyid=11009](http://www.primadanoi.it/modules/bdnews/article.php?storyid=11009) (tarkastettu 15.9.2007). Sieltä italian kieltä osaavat voivat lukea asiasta.

*Jukka Noponen*

# Russell John Milton


5.6.1924 – 14.8.2007

La 14-an de aŭgusto 2007 forpasis Russell John Milton, kiun konis ĉiu aktiva esperantisto en Finnlando. Nur la plej novaj amikoj de la internacia lingvo eble ne havis okazon renkonti lin, ĉar dum la lastaj jaroj li ne plu povis regule partopreni niajn kunsidojn, ĉu la aŭtunajn, ĉu la vintrajn tagojn de EAF, ĉu la ĉiusemajnajn amikajn babiladojn de ĉefurbaj esperantistoj. Inter la esperantistoj li estis konata simple kiel Milton, "nia Milton", multaj konis ankaŭ la nomon José.

Li naskiĝis en Kunming, Ĉinujo en 1924, kiel filo de brita diplomato. Dum sia vivo li pasigis jarojn en Britujo, dum la dua mondmilito ankaŭ en la Brita Hindujo, kaj poste en Sud-Ameriko. En 1951 li ekloĝis en Finnlando, kiu poste estis lia hejmlando. Ĉi tie li trovis en 1957 ankaŭ sian edzinon Pirkko. Ili havas filon kaj filinon. Profesie R. J. Milton laboris kiel tradukisto el la finna en la anglan.

Milton estis ŝatata instruanto de la internacia lingvo en la ĉefurbo, kie li dum multaj jaroj regule gvidis kursojn. Pro siaj elstaraj meritoj li estis nomita honora membro de la Esperanto-Klubo de Helsinki. Jam ekde 1953 li estis fakdelegito de Universala Esperanto-Asocio kaj kiel la loka delegito li funkciis 1971–2005. Li estis membro de la loka kongresa komitato de la 54-a Universala Kongreso en 1969. En Esperanto-Asocio de Finnlando kaj en la loka klubo li longe servis kiel estrarano. Kunredaktanto de la landa organo *Esperanta Finnlando* li estis 1967–1969 kaj 1975–1977.

Persone mi plej vive memoras la ne tre longan sed des pli aktivan kunlaboron kun li en redaktado de Esperanta Finnlando en la jaroj 1967 kaj 1968. Lia rego de la lingvo estis bonega, kaj li estis severa revizianto de tekstoj, ankaŭ jam kompostitajn tekstojn li provlegis akraokule kaj volis ĉion korekti antaŭ la preso.



El la skribmaŝino de Milton venis kelkaj tekstoj, kiujn mi konsideras vere elstaraj en la historio de Esperanta Finnlando, ĉar la landa organo ĉefe estis kaj estas iom seka raportanto pri movadaĵoj. Li eĉ prenis sur sin rolon de vera esplora raportisto: memorinda estas lia artikolo (EF nro 5/1967) pri vizito ĉe Aino Kassinen, tiam publike konata klarvidantino, por demandi ŝin pri estonteco de Esperanto. Li raportis ankaŭ pri unu milito en Sud-Ameriko, en kiu tiea lando perdis duonon de sia teritorio, milito tute nekonata en Finnlando, eble ĉar tiam en 1942 ni havis tro da propraj problemoj. Milton vizitis la landon post la dua mondmilito, kaj rakontas, kiom fortajn sentojn eĉ kantoj povas esprimi pri tia afero. Mi proponas, ke Esperantolehti konsideru republikigi tiun artikolon el EF 7/1967, ĉar ĝi rakontas ne nur pri nekonata milito sed ankaŭ ion pri la vivo de Russell John Milton.

Mi estas certa, ke la esperantistoj, kiuj konis lin, ĉiam konservas memoron pri la afabla, ĝentila, brite ĝentlemana persono, kiu iam nomis Esperanton sia gepatra lingvo

Harri Laine

# Suomen Esperantoliiton jäsenjärjestöt

**Muutokset ja lisäykset osoitteistoon: Ilkka Santtila, Fleminginkatu 12a A 16, 00530 Helsinki, s-posti [ilkka.santtila@welho.com](mailto:ilkka.santtila@welho.com).**

Suomen Esperantoliiton paikallis- ja jäsenjärjestöt:

- ♦ Helsingin Esperantoseura / Esperanto-klubo de Helsinki, Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki. [www.esperanto.fi/helsinki](http://www.esperanto.fi/helsinki) [jukka.p@esperanto.fi](mailto:jukka.p@esperanto.fi) (Jukka Pietiläinen)
- ♦ Iisalmen Esperantoklubi / Esperantoklubo de Iisalmi, (Onni Kauppinen) Uudispihantie 298, 74100 Iisalmi. ☎ 0500 813 530 [onni.kauppinen@pp.inet.fi](mailto:onni.kauppinen@pp.inet.fi)
- ♦ Jyväskylän Esperantokerho / Esperantoklubo de Jyväskylä (Seija ja Kari Kettunen), Keihäsmiehenkatu 3, 40630 Jyväskylä. ☎ (014) 254 609 [kari.kettunen@pp1.inet.fi](mailto:kari.kettunen@pp1.inet.fi)
- ♦ Lahden Esperantokerho / Esperantoklubo de Lahti, (Martti Pennanen) Kalliomaankatu 10, 15150 Lahti. [martti.pennanen@phnet.fi](mailto:martti.pennanen@phnet.fi)
- ♦ Oulun esperantoseura / Esperanto-societo de Oulu ry, (Olli Pajula) Salamakuja 4 as 2, 90420 Oulu. <http://esperantooulu.info/> [olli.pajula@baanamail.fi](mailto:olli.pajula@baanamail.fi)
- ♦ Salon Esperantoseura / Esperantoklubo de Salo (Eero Saari) Kössinkatu 2 as 7, 24100 Salo. ☎ (02) 735 6130
- ♦ Esperantoseura Antaŭen ry. / Esperantosocieto Antaŭen, Satakunnankatu 30 C 6, 33210 Tampere. (Markku Saastamoinen, Siukolantie 9 H 12, 33470 Ylöjärvi. ☎ 050 327 8528 [markku.saastamoinen@jippii.fi](mailto:markku.saastamoinen@jippii.fi))
- ♦ Turun Esperanto-yhdistys ry. / Esperanto-societo en Turku, (Tiina Oittinen) Puutarhakatu 26 A 11, 20100 Turku. [tiina.oittinen@pp.inet.fi](mailto:tiina.oittinen@pp.inet.fi)
- ♦ Suomen opettajien esperantoyhdistys / Esperanto-Ligo de Finlandaj Instruistoj, (Carola Antskog) Brokärsvägen 89, 25700 Kimito. [cantskog@kolumbus.fi](mailto:cantskog@kolumbus.fi). Tilinro: 445023-283606
- ♦ Sokeiden esperanto-yhdistys Steleto. (Ritva Sabelli) Pietarinkatu 10 D 27, 00140 Helsinki. ☎ (09) 660 651
- ♦ Suomen nuorten Esperantoliitto / Finnlanda Esperantista Junulara Organizo (FEJO) Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki. [fejo@esperanto.fi](mailto:fejo@esperanto.fi). Tilinro: 563000-2213606

Jäsenyhdistysten jäsenet ovat automaattisesti Suomen Esperantoliiton jäseniä, yhdistykset hoitavat jäsenmaksut liittoon. Liittoon voi myös kuulua henkilöjäsenenä, jolloin jäsenmaksu v. 2007 on 18 e sisältäen Esperantolehden. Nino Runeberg -seuran jäsenmaksu on 36 e. Lisätietoja jäsenyhdistyksiltä ja liiton toimihenkilöiltä.

Lappeenrannassa toimii aktiivinen esperanton harrastajien ryhmä, jolle voi lähettää postia osoitteeseen (Irja Miettinen) Esperantogrupo de Lappeenranta, Yrjönkatu 6-8 A 1, 53600 Lappeenranta.

Hämeenlinnassa on perustettu uusi yhdistys, Verda Kastelo R.Y. – Esperanto-Societo en Hämeenlinna, joka ei vielä ole EAF:n jäsenjärjestö. Yhteystiedot: Markku Sarastamo, Jyrätie 6 a 15, 13500 Hämeenlinna. [verdakastelo@gmail.com](mailto:verdakastelo@gmail.com)

Useiden paikkakuntien puhelinluettelosta hakusanan "Esperanto" kohdalta löytyy paikallisten harrastajien puhelinnumeroita. Paikkakuntien yhteyshenkilöistä saa tietoa myös Suomen Esperantoliitolta, aktiivisia harrastajia on mm. Mikkelissä, Raumalla ja Taivalkoskella.

## ESPERANTOLEHTI

ilmestyy vuonna **2007**  
aperas dum la jaro

Nro	Red.grupo komencas	Limdato	Aperas
6	20.11.	1.12.	15.12.

Avustajien toivotaan noudattavan edellä esitettyjä aikoja. La redakcio esperas, ke helpantoj atentu la datojn supre.

### Ilmoitushinnat ♦ Anonprezoj

Ulkopuoliset mainostajat /

Ekster membraro:	Jäsenet / Membroj:
1/1 sivu/paĝo 100 e	1/1 sivu/paĝo 50 e
1/2 sivua/paĝo 60 e	1/2 sivua/paĝo 30 e
1/4 sivua/paĝo 40 e	1/4 sivua/paĝo 20 e

Sendu la anoncojn aŭ rete al la redaktejo: [eaflehti@esperanto.fi](mailto:eaflehti@esperanto.fi) aŭ poŝte al la oficejo: Esperantolehti/EAF, Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki.

## Eventokalendaro de EAF

### Jubilea jaro 2007

15.12.2007 Malferma tago en la oficejo je 12-17 h, Helsinko

### Laborkunsidoj

24.11.2007 Estraro, la oficejo

### 2008

marto 2008 Vintraj Tagoj, ĉefurba regiono  
23-27.6.2008 Esperantokursoj, Heinävesi  
(Valamon kansanopisto)

19-26.8.2008 Universala Kongreso de Esperanto, Roterdamo, Nederlando (UEA)

26.7-2.8.2008 Internacia Junulara Kongreso, Szombathely, Hungario (TEJO)

## duplustro



### Seuraava numero ♦ Venonta numero

Seuraava numero ilmestyy joulukuussa. Jutut 1.12.2007 mennessä EAF:n toimistoon. La venonta numero aperos en decembro. Artikoloj ĝis 1.12.2007 al la oficejo de EAF. Osoite/adreso: Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki, puh/tel. (09) 715 538, s-posti/rete: <eafllehti@esperanto.fi>.